

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Festo de la 15^{an} de decembro 2008 ĉe UNESKO

Interrete troveblaj estas diversaj raportoj, videoj kaj fotoj pri la kunveno okazinta en la pariza sidejo de Unesko la 15an de decembro 2008 memore al la 150^a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof (1859-2009).

Inter la ĉeestantoj estis s-ino Maria Wodzyrińska-Walicka (ambasadorino de Pollando), s-ino Ina Marčiulionytė (ambasadorino de Litovio), D-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de Lejzer Ludwik Zamenhof. Uneskon reprezentis s-ro Mauro Rosi (sekcio de la kreaĵ industrioj por disvolviĝo). Prelegis prof-ino **Henriette Walter**.

Raporto de Arno Lagrange ĉe Ipernity: <http://www.ipernity.com/blog/48442/99767>

La eventon anoncis la retejo de Unesko kaj i.a. **Libera Folio**: <http://www.liberafolio.org/2008/unekoizam/>

Célébration du 15 décembre 2008 à l'UNESCO

Divers rapports, vidéos et photos peuvent être trouvés sur la Toile à propos de la réunion qui a eu lieu au siège parisien de l'Unesco le 15 décembre 2008 en mémoire du 150^e anniversaire de la naissance du Dr Zamenhof (1859-2009).

*Parmi les participants se trouvaient Mme Maria Wodzyrińska-Walicka (ambassadrice de Pologne), Mme Ina Marčiulionytė (ambassadrice de Lituanie), le prof. Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, petit-fils du Dr Lejzer Ludwik Zamenhof. L'Unesco était représenté par M. Mauro Rosi (Division des industries créatives pour le développement). Mme **Henriette Walter**, professeur émérite de linguistique à l'Université de Haute Bretagne, y a présenté une conférence.*

Rapport de Arno Lagrange sur Ipernity: <http://www.ipernity.com/blog/48442/99767>

L'événement a été annoncé entre autres sur le site de l'Unesco "Libera Folio": <http://www.liberafolio.org/2008/unekoizam/>

Mesaĝo de la prezidanto de UEA, okaze de la kunveno ĉe Unesko en Parizo.

Message du président de l'Association universelle d'espéranto lors de la célébration de la journée Zamenhof, au siège social de l'UNESCO à Paris, le 15 novembre dernier.

Karaj kaj estimataj,

Okaze de la Zamenhof-tago en tiu ĉi ŝlosila jaro, mi sendis aleksteran mesaĝon al hodiaŭa lingvorajta kunveno en la Unesko-sidejo en Parizo. Ĝin iniciatis la pola kaj la litova delegacioj al Unesko kun preteco kunagi kun UEA. La eventon konkrete organizis iuj miaj diligentegaj gekolegoj. Mi petas, ke vi emfaze aplaŭdu ilian fortostreĉon kaj malavarecon.

Dume, jen alkomunuma mesaĝo mia!

Sur la sojlo de la 150-jariĝo de Zamenhof, ni devas konstati, ke nia laboro finfine atingis sian vere komencon stadion. Post pli ol jarcento da laborado, la esperantistoj sukcesis:

(a) funkciigi vere vivantan lingvon, kies korpon produktis intertrakta procezo envolvanta modere grandan aron da lingvoj kaj sufiĉe klare ekzemplanta la intertraktadon mem;

(b) montri, ke komunumo kapablas, laŭ la modelo indikita de Zamenhof en sia Dua Libro, akcepti lingvodonacon de majstra iniciatinto, evoluigi ĝin laŭ demokratiaj linioj, kaj restadi ne sendanka al la majstro sed samtempe firme kapabla socie porti la lingvon sen absoluta dependo de la kapricoj de unu individuo;

(c) imagi kulturen mondon, same aŭ pli vigle ol la naciaj literaturaj elitoj, kiuj per sia verkado imagas siajn naciojn - la nuntempa kompreno de nacioj donas ĉefrolon al la 'imagado de la nacio' fare de ĝia literatura elito; doni konkretan, vivantan, relaksan formon al monda konversacio, en kiu la aparta reliefigado jen de budapeŝta, jen de skota, jen de praga, jen de iberia skolo naĝas en akvo kies freŝecon daŭre garantias internacia komunumo verve deziranta la egalrajtecon de popoloj kaj do aktive leganta la ĉefverkojn de Mickiewicz kaj



Madach kaj Kiwi kiam ili aperas en Esperanta traduko - dum iliajn tradukojn en ekzemplo la angla ne legas la internacia legantaro de tia tradukilo;

(ĉ) parte pere de la imagado de tiu kultura mondo kaj parte per sendependaj rimedoj kreaĵaj sine de diversaj movadoj kaj organizaĵoj (mi metonime nomu la ekzemplon SAT, sed ĝi estis/estas nur la plej grava inter pluraj), koncepti la ideojn kaj strukturajn kondiĉojn por daŭripova kaj vigla paco, sen la nerealisma trudado de dolĉaj kaj ŝajnaj harmonioj koste de seriozaj solvoj al la problemoj de la kuna vivado;

(d) meti la demandon de la lingvaj homaj rajtoj firme sur la internacian tagordon kaj iniciati - tra la tiutempe ne tre volontaj korpaj kaj mensoj de neesperantistaj socilingvistoj - studadon de la lingvoplanado rilate la problemon de internacia lingva komunikado, tiel ke tiu tereno de studado floru; ĉi tiun sukceson de la iniciato Lapenna-Sadler, lanĉi sub la egido de CED de UEA la revuon LPLP (pranome LMLP) kiel ejon por tiu diskuto, ni nesufiĉe reliefigis, nun kiam ĉie konatiĝis la graveco protekti la endanĝerajn lingvojn, kaj kiam la publiko ne demandas, kiuj respondecis pri la kultivado de tiu studkampo en momento kiam preskaŭ neniu konsciis pri ĝia urĝeco;

(e) konsciigi la homojn, ke ankaŭ la lingva kaj kultura demokratio troviĝas inter la konkretaj rajtoj kaj bezonoj de la homoj, kaj ke ilia malplenumiĝo estigas sendigniĝon, suferon, kaj proan mankon de la plena disvolviĝo de la homa potencialo ĉe la viktimoj de lingva kaj kultura diskriminacio;

(f) identigi la aldonan (diference de la subtraha) plurlingvismon kiel konkretan pozitivan aliron al la demando, kiamaniere plej bone protekti la rajtojn de la lingvaj malplimulto, kaj klare opozicii kontraŭ la asimilismaj strategioj de ŝtatoj, kiujn UEA

sub la gvido de Lapenna nomis lingve genocidaj kaj kiujn TEJO en la "momento de Tyreso" nomis lingve imperiismaj;

(g) aliĝi al la malfacila projekto al la konstruado de mensa bazo por serioze daŭripova paco per konkreta programo eduki la infanojn por ke ili estu planedanoj kaj por ke ili vidu, ke la homa emancipiĝo okazos nur se ni fasonos inkluzivemajn vojojn de pluiro - projekto ankoraŭ ne aperanta sur la ĝenerala publika tagordo sur tiu skalo, sur kiu jam aperas la kompreno pri la bezono konservi la endanĝerajn lingvojn kaj kulturojn.

Per tiu laborado, la esperantistoj laŭ mia takso sukcese omaĝis al la vivoverko de Zamenhof, kaj certigis, ke li ne estu vivinta vane. Mi volas, stare kun vi, festi la momenton, en kiu ni rigardas ĉi tiujn atingojn de la internacia komunumo, kiu per lia lingvo laboradis sub ekstreme rigoraj kaj malagrablaj kondiĉoj.

Ne estas sufiĉe emfazi, ke Esperanto estas facila. "Ankaŭ arestitoj kaj kondamnitoj en karceroj vivas en paco," diris Lapenna. "Ni ne estas por tia paco." Ankaŭ viktimoj de asimilismo kaj trudado de granda lingvo, se ili estis devigataj akcepti tiun trudon en sia infanaĝo, trovas facila la devige lernitan lingvon; ni ne estas por tia facileco. Esperanto estas facila ponto, kies ekzisto invitas la homojn iri duonvoje por renkonti la alian, invitas la homojn konscie kunagi kun la aliaj por ebligi la renkontiĝojn. Nia lingvo stimulas la kunagemon de la homoj, ne ilian konsumisman emon pasive pasaĝeri en veturilo posedata kaj funkciigata de iaj mastroj. Zamenhof genie laboris, por ke estu facila tiu kunagado - ne por ke la posteuloj estu maldiligentaj kaj malkolegaj.



Ni restu sur tiu vojo al la stimulado de la heroo, amika, pionirema aspekto de la homa spirito.

Amike salutas,

Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA



Esperanto-Societo Kebekia Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado: Normando Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Grafismo kaj muntado: Francis Gauthier. Estraranoj de ESK: Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Normand Fleury (kasisto), Suzanne Roy (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro: 2009.03.01

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction: Normand Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Graphisme et montage: Francis Gauthier. Administrateurs de la SQE: Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire), Normand Fleury (trésorier), Suzanne Roy (conseillère).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



Kristnaska fabelo

Francisko Lorrain

Tio, kion mi al vi rakontos, ne estas unu el tiuj malnovaj fabeloj transdonitaj de generacio al generacio dum longaj vintraj noktoj, sed nuntempa okazintaĵo — tia, kia eĉ nun foje okazas en niaj grandaj urboj. Antaŭ pluraj jaroj oni rakontis ĝin al mi.

Iuvespere — estis fakte la vespero antaŭ Kristnasko —, viro paŝis sola en la strato. Ĉu juna, ĉu maljuna? Mi ne scias. Sed li sentis sin maljuna kaj nenion plu atendis. Li promenadis tra la centraj homplenaj kvartaloj de la urbo, kaj horon post horo prokrastis sian revenon hejmen, al sia fora kaj soleca loĝejo.

Eble tamen li ne estis tiel melankolia, kiel oni povus imagi. En la voĉoj de la homoj, en iliaj gestoj, en tiu apartspeca malvarma aero, kiun oni spiras, kiam neĝo falas kaj ĉion iom post iom ekkovras — li provis kapti... la spiriton de Kristnasko, per kiu li sopiris pleniĝi.

Intertempe fariĝis malfrue. Li ekkuris, esperante trafi la lastan buson hejmen. Jen ĝi, atendanta! Frapinte ĉe la pordo, senspire, kaj kun tiu bela rideto, kiun montras ĉiuj homoj kure trafintaj sian buson, li engrimpis,

ĵetante "Feliĉan Kristnaskon!", kun sincera gajo, kiu lin mem surprizis. Tuj ekveturis la buso. Li rigardis sian brakhorloĝon : "Ho! La buso malfruas kvin minutojn!" Strange, li estis la sola pasaĝero. Sed tion li ne atentis kaj komencis babili kun la ŝoforo. Pri ĉio kaj nenio. Eniris neniu alia en la buson, kiu rapidis en la neĝo, laŭ la stratoj kvazaŭ novaj kaj virgaj. Ilia konversacio fariĝis pli intima. Ili rakontis unu al la alia la momentojn plej belajn, kaj tiujn plej malfacilajn en siaj vivoj. Malnovaj poemoj delonge forgesitaj revenadis al ilia memoro. Inter iliaj interŝanĝoj, silentoj longaj — pacaj... Jarojn poste, tiujn silentojn li plej klare memoris.

Tagiĝis. La buso senmovis. Li pensadis. "Jen! Strange, la ŝoforo foriris." Sed, vidante la lokon, kie li troviĝis — la lokon mem, kien li kurante alvenis la antaŭan vesperon —, la neĝon ĉiam falantan, la homojn ekstere atentantajn trankvile, en tiu radia blankeco, tiam li eksuspektis, ke tiu ŝoforo eble ne estis ordinara busŝoforo.

Dum ili parolis, ili neniam menciis siajn nomojn. Ĉu oni diras sian nomon al busŝoforo, aŭ al pasaĝero? Sed, enirante sian loĝejon, kun tiu sama sento, delonge ne spertita, tiu sento havi antaŭ si sian tutan vivon, li ĵetis sin sur la telefonon kaj vekis amikon sian... "Tute ne! Ververe! Liaj rakontoj ĉiam temis pri malvarmo, neĝo... Kaj, Dio mia, nun mi ekkonscias — mi ne scias, kial mi ne rimarkis tion — liaflanke sidis iuspeca strangforma sakego!..."



Francisko Lorrain legis al ni belan Kristnaskan rakonton, kiun li verkis, dum la decembra esperanto-kunveno en Montrealo.



Mia unua ARE... ...Kaj ne mia lasta!

De la 11^a ĝis la 13^a de oktobro okazis la 15^a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto en Silver Bay, Novjorkio. Oni jam parolis al mi dum la somero pri tiu renkontiĝo, kaj mi ne certis ĉu indas elspezi por partopreni tian semajnfino. Do, se vi, aŭ amiko via estas en la sama situacio, atentu pri mia sperto kiel nova esperantisto kiu rakontas al vi miajn freŝajn memoraĵojn pri tiu mirinda semajnfino!

Unue, mi priskribos al vi la detalojn pri la loko, kiel en la plej ordinara turisma vojaĝ-rakonto de via onklo. Sed prave! Ĉar ekde mi alvenis surrante de George lago, mi tuj komprenis ke la elekto de tiu loko devis esti tute senpena! Meksikanoj petis al mi, dum TAKE, fotojn de la koloraj folioj dum aŭtuno, kaj ŝajnis al mi ke mi ne havos pli bonan ŝancon impresi ilin. Kia spektaklo! La lagon, sidanta inter dekoj da montetoj, kvankam tre bela, oni ne tiom rimarkas. La kulpo iras al la miloj da varmaj nuancoj lumigantaj en la montetoj por iu ajn kiu pasas apud la lago. Sed vi ne devas multe marŝi por vidi tion. Ĉiuj konstruaĵoj estas apud la lago! Ekde nun, vi povas imagi la dekoracion...

Sed la aktoroj multe pli indas vian atenton! Partoprenis 46 homoj el Usono kaj Kanado, kiuj nur volis konatiĝi kun mi, verŝajne. Mi parolis pri politiko kun Rogero de Masaĉusetto kaj pri teknologio kun Marko de Ĉikago. Mi iom pli konis Benjamin de Otavo... kaj multaj aliaj!

La programo de la semajnfino estis simpla : prelegoj dum la tago kaj malstreĉigaj faradoj vespere. Pri la prelegoj, min aparte interesis « Pitagoro kaj lia teoremo », sabate posttagmeze, kaj vigla grupo-diskutado « Esperanto ne estas lingvo! »,

dimanĉe matene. Certe, restis la ebleco boati sur la lago aŭ ludi korbopilkon kiam la prelegantoj estis tro... adaptitaj al la komencantoj :-). Persone, mi preferis spiri aŭtunan etoson marŝante tra la arbaron.

Kaj mi estis kontentigita! Ĉar dimanĉo, ĉirkaŭ la kvara horo, la plejparto el ni iris promeni en la arbaron kun... gvidisto de la Montreala Botanika ĝardeno! Tiuj kiuj konas Normando (Montrealo) scias ke promenado kun li en arbaro ĉiam igas vin pli konanta. Eble mi ne memoras la nomojn de la plantoj (pardonu min Normando), sed mi scias almenaŭ ke kun du aŭ tri aliaj esperantistoj, en simila okazo, ni memoros multe!

Sed kial kuniĝi tiel fore en la arbaro kun tiom da amikoj se oni ne... malstreĉiĝas! Tiucele la du vesperoj estis plenigitaj kun plaĉaj faradoj, ĉiam pli kaj pli amuzaj. Sabate, mi konis pli da homoj ol mi iel ajn povus en duona horo. Mi ankaŭ kontrolis miajn konojn kaj amuziĝis per diversaj grupaj ludoj, dum la sama vespero.

Dimanĉe vespere estis tute dediĉita al... kulturo! Sed oni povis senti ke la esperantistoj ne sufiĉe preparis ion, aŭ tio estis... meza nivelo. Krom teatraĵo kaj kelkaj pianaj intervenoj, oni povis senti veran mankon da pretaj interesaroj el la partoprenantoj. Sed tio estis pridiskutita en la morgaŭo, kiam ni interkonsentis pri la sekvanta ARE. ARE 2009 eble havos la plej riĉan kulturen vesperon en sia historio, se ĉiuj ni plej brile kiel eble pretigos ion!

Jes, vi bone komprenas, tio estas rendevuo! :-)

Francisko Gauthier, Trivero, Kebekio

En oktobro 2008, sukcese okazis la 15^a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto.





fono. La hodiaŭa kurzo estas ¥1000 po monbileto (mi uzas enojn ĉar mi estas en Japanio nuntempe). Se vi aĉetas dek, la afranko estas senpaga.


Bonvolu divastigi la novaĵon! Kun amikaj salutoj,

Daniel Salomon

Direktoro de la Sennacia Banko

www.heliko.org

PS : Via aĉeto ne nur estas valora subteno al malriĉa artisto kiu laboras kun esperanto, sed ankaŭ bonega investo!



Le site web de RememberTheMilk.com est maintenant en espéranto et permet de créer des listes de choses à ne pas oublier, des dates d'anniversaires, etc.

RememberTheMilk.com disponebla en Esperanto

Mi informas, ke la retservo RememberTheMilk.com nun estas disponebla en Esperanto, tradukita de mi. Temas pri Web 2.0 - ilo por organiziĝi, krei listojn de fendaĵoj kun limdatoj, alar-
moj, k.s. Oni povas havigi ilin al kunlaborantoj aŭ familianoj, aldoni RSS-fluon de taskoj al ies RSS-ilo, aŭ uzi ĝin kune kun Google Calendar, iPhone, ktp.

Por trovi la Esperanto-version iru al :

<http://www.rememberthemilk.com/?hl=eo>

Ĝuu kaj raportu eventualajn tradukproblemojn al mi, mi petas.

Tim Morley t_morley@argonet.co.uk

Fonto : Ret-Info <http://www.eventoj.hu>



Nova versio de Economix

Nova versio de Economix, senpaga programo de mastrumado de bakkontoj funkcia kun Mac OS 9, Mac OS X, Power PC, Intel, Windows, Linux, x86 kaj uzebla en EN, DE, ES, FR kaj EO estas elŝutebla sur la retejo de Y. Callaud <http://y.callaud.free.fr>

<http://y.callaud.free.fr/economix/economix.html>

Tabelo indikas la haveblajn versiojn kaj diverslingvajn uzinstrukciojn.

Le site web espérantophone "Farbskatol" est de nouveau actif. Quatre nouvelles vidéos humoristiques y furent ajoutées, dont une présentant une recette de cuisine.

La filma retejo Farbskatol' revigliĝas!

Ekde oktobro 2008, oni aldonis al la Esperanta filma retejo <http://farbskatol.net/> kvar filmetojn, produktitajn bonkvalite kaj originale en Esperanto.

Danke al la iniciato de la israela Esperanta grupo LEEN (La Estonto Estas Nia), oni produktis tiujn ĉi 4 filmetojn iamaniere rilatajn al itala etoso: humura sed trafa recepto por "gnocchi di patate" kaj bildstriaĵoj/sonaj filmetoj el "La gefianĉoj" (I promessi sposi).

Laŭlane aperos, dum la venontaj du monatoj, movadaj kaj turismaj filmetoj originale produktitaj en Esperanto. Krom la amuziĝo, niaj filmeroj celas fariĝi helpmaterialo por lernado de Esperanto.

Ni invitas vin viziti la ttt-ejon, voĉdoni kaj aldoni komentojn.

Se vi deziras kontribui al nia filmproduktada agado, sendu retpostan mesaĝon al :

Gian Piero Savio esperantisto@live.com

Fonto : Ret-Info <http://www.eventoj.hu>



"Vikipedio" <http://eo.wikipedia.org/>, la Esperanto-versio de "Wikipedia", atingis hodiaŭ, 21^{an} de novembro 2008, la nombron de 107 007 artikoloj. Laŭ la ĝenerala multlingva statistiko (malpli aktuala) ĝi atingas 104 503 kaj situas je la 22a loko inter 264 lingvoj.

Por ke Vikipedio progresu, ne nur laŭ nombro de artikoloj, sed ĉefe laŭ kvalito kaj fidindeco, trejnseminario okazis antaŭ nelonge apud Prago kadre de la Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). Por faciligi la arigon, instruadon kaj trejnadon de kunlaborantoj, Yves Nevelsteen kreis, kadre de la plurlingva retejo e@i (Edukado@Internet : <http://www.ikso.net/eo/index.php>), retejon <http://www.vikipedio.net> kiu ebligas al interesatoj trovi helpon kaj konsilojn. Interesatoj kaj informantoj trovos, i.a., prezenton pri la nova libro "Vikipedio por vi" de Ziko van Dijk (60 p. en A5-formato), liston de asistantoj, konsilantoj kaj helpantoj :

http://www.vikipedio.net/index.php/Teamo_de_asistantoj





Demande d'envoi de cartes postales pour un cours optionnel d'espéranto, non obligatoire, avec une valeur de 3 points, qui commencera à l'Université de Costa Rica pour des étudiants de presque toutes les carrières. 16 étudiant(e)s sont inscrits.

El Edukado.net

Baldaŭ komenciĝos mia somera baza E-kurso, kiu anstataŭigas tiun ĉiu-jaran, semestran kurson por studentoj en preskaŭ ĉiuj karieroj je la nivelo bakalaŭro. Samkiel la alia, ĝi valoras 3 kreditpoentojn kaj ne estas deviga, sed elektebla. 16 gestudentoj enskribiĝis.

Bv. sendi bildkartojn kun salutoj al jena adreso :

Esperanto-kurso/H. Mora
Escuela de Filología
Universidad de Costa Rica
C. P. 11501-2060
San José, Costa Rica

Kursfine oni aranĝos bildkart-ekspozicion. Foton oni sendos al tiuj, kiuj skribos sian retadreson.

Si vous aimerez découvrir des chansons en espéranto sur le web, le site suivant en contient. Le site de Vinilkosmo est aussi une bonne référence.

Retejoj pri esperantaj kanzonoj

Karaj geamikoj, bonvolu viziti niajn paĝojn pri esperantaj kanzonoj :

<http://kanzonamikaro.worsten.org/eo-kanzonoj/videofilmetoj.htm>

En la interreto oni povas trovi kelkcent kanzonojn en Esperanto kaj multajn videofilmetojn kun kanzonoj kaj lingvaj ludoj, kiuj povas pliriĉigi agadon de lokaj kaj lernejoj Esperanto-Grupoj. Se nia retejo ekplaĉos al vi, tiam bonvolu informi pri ĝi, viajn konatulojn. Kun elkoraj salutoj, kanzonamikaro el Vroclavo, Silezio, Pollando.

<http://kanzonamikaro.worsten.org>

Avo Frosto respondis al 34 infanoj el 9 landoj en decembro 2008. Pola Radio vokis lin por fari intervjuon pri la fakto ke Avo Frosto respondas en esperanto ekde 2002.

Deux nouvelles gares informent les voyageurs en espéranto. Il s'agit des gares de Białystok en Pologne et de Herzberg en Allemagne.

En la urbo Białystok daŭras la preparoj por la venonta Universala Kongreso.

Por faciligi vojaĝon al niaj e-gastoj, la 14^{an} de decembro en 2008, okaze de la ŝanĝo de la fervoja horaro, ĉe la kajoj de la stacidomo en Białystok okazis inaŭguro de grandformataj informtabuloj. Ili estas faritaj dulingve : la informoj kaj la priskribo de simboloj de la fervoja horaro estas legeblaj en la pola kaj en Esperanto.

Inf : Robert Kamiński, rk-lodzo@poczta.wp.pl

Depuis février 2008, une nouvelle radio est offerte via le web : Radio Espéranto. Elle provient de Kaliningrad en Russie.

Radio Esperanto ekfunkciis en februaro 2008 en Kaliningrado (Ruslando). Komence estis planite disaŭdigi literaturajn tekstojn en ĉiu dua sonprogramo, sed ekde la 11a programo ili aperas preskaŭ en ĉiu elsendo. Entute, Radio Esperanto aperigis 18 sonprogramojn en kiuj estis (krom du poeziaj) dek du prozaj programeroj. Estis sonregistritaj kaj enretigitaj tri originalaj tekstoj kaj naŭ tradukoj el la lingvoj: rusa, hispana angla kaj pola. Ĉar Radio Esperanto aperas en la formo podkasta, ĉiu programo estas aŭskultebla kaj elŝutebla en iu ajn oportuna tempo en la retejo : <http://la-ondo.rpod.ru/>

Letero al la redakcio

Hieraŭ mi tralegis la Riveregon, kiun mi ricevis dum ARE, kaj ĝi elvokis tiom agrablajn momentojn ke mi volis danki denove pro ĉio, pro la artikoloj de Zdravka, kaj de Normando, pro la TAKE-organiza laboro, kaj ankaŭ pro ARE same.

TAKE estis por mi plej elstara semajno inter ĉiuj el pasintaj eble du (eble pli da) jaroj. Kaj ĵusa ARE estis plej elstara semajnfino, malgraŭ la longa (pli ol devus) vojaĝo tien -- ĉiuj minutoj, kun la novaj (kaj malpli novaj) amikoj, survoje al ARE, dum ARE, kaj survoje reen, egale valoris. Nu. Dankon ree. Suzano :)



Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

La kunvenoj okazas en la Restoracio Commensal, 1720 rue Saint-Denis, Montréal. - Metroo Berri-UQÀM. Ni kunvenas ĉe la subteretaĝo, ofte en la eta salono.

Eblas alveni je la 18^a horo se vi volas kunmanĝi. La kunsido komenciĝas je la 19^a horo por la komencantoj kaj je la 19 h 30 por tema diskuto.

Kiam

Vendredo 30^a jan. 2009

Vendredo 27^a feb. 2009

Vendredo 27^a marto 2009

Vendredo 24^a aprilo 2009

Vendredo 29^a majo 2009

Vendredo 26^a junio 2009

Temo

Agadoj por la E-movado en 2009 kaj poste...

Zingibro -Varmiga spico por malvarma sezono

Decidota

Decidota

Decidota

Decidota

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

16-18 ^a de majo 2009	6 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Toronto, Ontario
10-12 ^a de oktobro 2009	16 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono.
22-24 ^a de majo 2010	7 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Tririvero, Kebekio
9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono.
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Québec, Kebekio

kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à :

riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi!)
(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendezuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement.

MEMO

Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org

Club d'espéranto de Trois-Rivières : esperanto3r@gmail.com